




DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Simpla : 3 fkoj / Sendotaj al : Micard Henri
Subtena : 5 fkoj / Kulturaj kajeroj
Bonfara : 10 fkoj / Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagó 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1961

5

KULTURAJ KAJEROJ

1961

Septembro - Oktobro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

..

El la Kulturdomo : Bilanco.

Esperanto tra la mondo.

Unu el niaj prelegintoj.

Fianke de la Historio : La ĉaspavilono de reĝo Francisko (E. Motillon).

Monda problemoj : Ĉu baldaŭ mankos la akvo (P. B.).

Sub la granda kverko : Somero en Grésillon.

El prelego : Edukado en antikva grekujo (P. Babin).

Tekniko kaj pasintaĵo.

Tra la Esperanta Literaturo :
H. Sentis (S. Guillot).

Fantaziaĵo : De helikoj... al geedziĝa feliĉo (P. Potin).

Por via distro : Nia konkurso.

Por viaj infanoj : Doktora Ĉioscia (Grimm. Tradukita de Kabe).

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

BILANCO

Post la fino de la somera vivoplena sezono en la Kulturdomo venas la tempo de la bilanco, ne la bilanco pri financoj sed pri aktiveco. Venas la tempo kiam la respondeculoj pripensas pri la diversaj aspektoj de la antaŭaj periodoj, kaj povas fari konkludojn, kiuj ebligas plibonigi la venontajn periodojn. Multaj spertoj estas malsamaj laŭ la jaroj ; influas la partoprenoj de la gesamideanoj, ĉefe eksterlandaj, pluraj faktoroj : loko de la U.K., internaciaj aŭ naciaj okazaĵoj, k. a. Tiujn faktorojn oni plej ofte ne povas antaŭvidi kaj la respondeculoj de la Kulturdomo estas devigataj ŝanĝi kelkajn programerojn lastmomente. Sed ĉiujare aliaj problemoj prentiĝas sub sama formo ; kelkaj il ili oni laŭeble solvas jaron post jaro ; kelkaj aliaj la administrantaro ne povas solvi ĉar ili dependas de la partoprenantoj mem. Pri tiuj problemoj ni deziras paroli al vi.

Dum la diversaj organizitaj periodoj la laboro estas granda, estas tre diversa. La deĵorantoj estas malmultaj ; ili povas zorgi nur pri la materia flanko : vivo de la domo, programo, organizo de la eventualaj ekskursoj, ktp. Sed ili mem ne povas esti ĉie kaj krei la « etoson ». Ili preparas plej zorge, laŭ siaj ebloj la kadron sed la etoson en tiu kadro dependas de la partoprenantoj mem. Tiu etoso estas ĉiam amikeca, sed kompreneble la lingvonivelo estas tre diversa. Tiu

fakto estas kuraĝiga en si mem ĉar necesas ke daŭre estiĝu novaj tavoloj de esperantistoj. Sed estus necese, ke la nombro de la lertuloj estus sufiĉa por helpi la komencantojn. Sed ŝajnas ke la lertaj francaj samideanoj vizitas la kulturdomon tiom longe, kiom ili bezonas ion, tiom longe, kiom ili deziras ricevi ion, sed ĝin forgesas, kiam ili sentas siajn flugilojn sufiĉe firmaj. Ili forgesas, ke Gresillon ne estas feriejo, kien oni venas por surloke lerni la lingvon, sed ankaŭ kreaĵo de la Esperantistoj por la Esperantistoj kaj ke tiu kreaĵo ne bezonas nur monon (la monon oni ĉiam bezonas por plibonigi la instalaĵojn sed la financa flanko estas sufiĉe kontentiga) sed ankaŭ animojn. Se ĉiu certa franca esperantisto vizitus ĝin dum kelkaj tagoj almenaŭ ĉiun kvaran aŭ kvinan jaron, se ĉiu eksterlanda esperantisto vizitus ĝin dufoje en sia vivo, la animo de la kastelo estus tia kia ni ĝin deziras, tia kia ĝi ne ĉiam estas : ne nur esperantista sed ankaŭ esperanta. Estas necese ke esperantistoj tien kunvenu sed ke tiuj esperantistoj estu ankaŭ esperantlingvanoj. Tro ofte oni aŭdas la internacian lingvon nur okaze de la aranĝoj : kursoj, prelegoj, konversacioj, vesperkluboj. Estas dezirinde ke eĉ ekster tiuj aranĝoj la lertuloj helpu (sed ne tedu) la malplilertajn gesamideanojn kiuj timas paroli esperanton. Tiucele estas necese, ke la nombro de la spertaj esperantlingvanoj estu sufiĉe granda en ĉiuj periodoj, ne nur en tiu aŭ tiu ĉi periodo, kiuj plenumas iliajn bezonojn.

El leteroj de niaj legantoj

S-ro C.A. Otto (Usono) :

« Dum pluraj jaroj mi deziris ke la Usona legantaro havu en la manoj gazeton similan al la via. »

S-ro Michel Du-Goninaz (Saharo) :

« La Kulturaj Kajeroj prezentas interesan iniciaton kaj per sia serioza kaj interesplena enhavo, plene meritis sian titolon. La aliaj revuoj povas preni el ĝi modelon. »

Ni dankas la multajn legantojn kiuj sendas al ni siajn kuraĝigojn. Dank'al ili, dank'al la ĉiam kreskanta nombro da abonantoj, « Kulturaj Kajeroj » fariĝos ankoraŭ pli interesa.

Venu en ĉiuj periodoj, gesamideanoj kiuj flue parolas la lingvon ! Rekompence vian helpon vi ricevos grandajn ĝojojn ĉar vi estos kompreninta ke la progreso de nia afero bezonas mal-egoismon.

REGUSTIGO

En la artikolo de Dro Albault aperinta en la lasta numero engligiĝis preseraro.

En la 4a linio, antaŭ fino de la 1a alineo legu : « duagrada kodo aŭ ia rudimenta lingvo sen ia ajn kapablo intelekta kaj artisma ».

Ni petas senkulpigon de la verkinto kaj de niaj legantoj.

Esperanto tra la Mondo



LA UNIVERSALA KONGRESO

— La 46a Universala Kongreso de Esperanto okazis de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto, en Harrogate, en la ĉeesto de 1700 reprezentantoj el 35 landoj.

— « Internacia Arta Teatro » prezentis, kun granda sukceso, la mezepokan francan farson « Advokato Patleno », « La P... respektama » de J.P. Sartre kaj « La homa voĉo » de J. Cocteau.

— La kongresa rezolucio deklaras, interalie, « ke maturiĝis la kondiĉoj por subskribo de interŝtata konvencio pri la laŭgrada paralela enkonduko de esperanto en la lernejojn kaj por instruistajn kolegiojn de pluraj ŝtatoj ».

— La kongreso universala 1962 okazos en Kopenhago.

SEMINARIO « ORIENTO-OKCIDENTO »

— 50 personoj el kvar kontinentoj partoprenis la seminarion « Oriento-Okcidento » kiu okazis inter la 2a kaj la 4a de aŭgusto en University College, en Londono.

La programo de prelegoj kaj vizitoj estis rimarkinde interesa.

ESPERANTO EN LA LERNEJOJ : GRAVAJ SUKCESOJ

— En Jugoslavio : estis decidite ĝeneraligi al la tuta lando la staton nunan en Slovenio : nedeviga instruado de esperanto en kiu ajn lernejo en samaj kondiĉoj kiel por la fremdaj lingvoj (kun honorariigo de la profesoroj kaj subteno de la eksterlerneja aktiveco de la ĝelernantoj).

Sub patronado de la nacia komisiono de UNESKO, internacia konferenco de la lernejoj, kie esperanto estas instruata, devas esti kunvokita.

— La pola ĉefministro, aliflanke, esprimis sin preta subskribi internacian konvencion pri lerneja instruado de la internacia lingvo, kondiĉe ke 5 ŝtatoj aliĝos.

EN 1962 : INTERNACIA KONGRESO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

— Ĝi okazos apud Romo en la katolika « centro por pli bona mondo » (14-21a de aŭgusto). Por aliĝi, skribi al Fino Elena Cipriani, Via Bonghi 34, Romo.

NOVA SENPAGA REVUO

— Nova dumonata gazeto estas senpage sendita al esperantistoj. Estas : « Okcidentgermana Revuo ». Oni povas mendi plurajn ekzemplerojn por grupanoj aŭ lernantoj. Adreso de la redaktoro : S-ro Jos. F. Berger, Koln-Richl, Ehrenberg-str. 1, Germanujo.

PROPONO DE POLA RADIO

— Radio Varsovio kiu elsendas ĉiutage duonhoran programon en esperanto, petas ĵurnalistemajn esperantistojn laŭeble plej ofte sendi al E-fako, sciigojn pri la E-movado en ilia lando. La artikolverkintoj povos ricevi interŝange de la uzita materialo, E-librojn.

ORGANIZO DE KOORDINITAJ KURSOJ

— La popol-altlernejo en Zurich (Svisujo) proponas la organizon de esperantaj koordinitaj kursoj por la E-kursoj en popolaj universitatoj, municipaj kursoj, centroj de popola edukado.

Por ricevi ĉiujn informojn, skribu al S-ino Tina Peter-Ruetschi, esperanto-kurso, Volkshochschule, Münsterhof 20, Züürich.

AMATORA FILM-FESTIVALO

— Internacia Ligo de esperantistaj Foto-Kino Amatoroj (pf. 6, Budapest 119) organizos en 1962 « Internacian esperantistan amatoran film-festivalon ».

SKI-FERIO POR JUNULOJ

— Kiel ĉiujare, fine de decembro, la junaj ĝeesperantistoj povos partopreni ski-ferion en Filzmoos, apud Salzburg. Skribu jam al S-ro Heinrich Reiter, Altmannsdorferstrasse 90, I, Wien XII (Aŭstrujo).

ESPERANTPAROLANTA FILMO EN LA FRANCA POŝTA ADMINISTRACIO


— La franca poŝta administracio povas pruntedoni mallongan filmon 16 mm. esperanto parolantan pri funkciado de la franca poŝto. Por disponi pri ĝi, skribu al nia samideano, S-ro Collob, 6 rue Dr. Roux, Saint-Maur-des-Fossés (Seine).

POR PROPAGANDO INTER UNIVERSITATANOJ : NOVA INFORMFOLIO DE U.E.A.

— U.E.A. ĵus publikigis — speciale por propagando en universitatoj — novan seslingvan informfolion por universitatanoj kun subskriboj de granda nombro da profesoroj.

Uzu ĝin en la koncernata medio !

UNU EL NIAJ PRELEGINTOJ



Dro André Albault

Kuracisto en Toulouse (Francujo)

Komitatano de U. E. A.

Eks. redaktoro de Pedagogia Revuo

Aŭtoro (Kum Sro Leger) de la tute

nova Vortaro - Franca - Esperanta

Desegno de Sino Lena Wessel

FLANKE
DE LA HISTORIO

LA ĈASPAVILONO DE REĜO FRANCISKO

En centra franclando, sude de Orléans, estas tute aparta lando, nomata Sologne, ankoraŭ nun preskaŭ sovaĝa. Pli ol 7.000 kvadratajn kilometrojn vasta, ĝi estas kovrata de profundaĵa arbaroj, kun marĉoj kaj lagetoj. Ĝi abundas je ĉasbestoj, kaj estas paradizo por ĉasistoj.

Dum la 16-a jarcento, ĝi estis grandparte nekulturita, kaj aspektis tute sovaĝa. Tie, la reĝa familio posedis grandan bienon, preferatan ĉasejon de la princoj. Sed, ĉasantoj, bone atentu! En tiuj arbaroj, kreskas la « vojerariga herbo ». Ve al tiu, kiu tretas ĝin? Li tuj forĝos la vojon, kaj dum tutaj tago kaj nokto, li devos vagadi senhelpe tra la arbaro. Post vesperiĝo, li certe renkontos, kaj devos sekvi la fantoman ĉasprocesion de grafo Tibaldo la Trompanto, vivinte dum la 10-a jarcento, kondamnita je eterna vagado kun siaj ĉashundoj pro ia malbonfaro. Nur ektagiĝo povos liberigi la malfeliĉulon, kiu surpasis la sorĉan herbon.

Iam, la juna kronprinco, Francisko, estis viktimo de la vojerariga herbo. Sed, kiam forperdinte la ĉasantaron, nokto jam ekkaptis lin vagantan, lia ĉevalo subite timigita haltis antaŭ salamandro. La princo desaltis de la ĉevalo, kaj feliĉe ekvidis tra la arboj la ruinaĵojn de la kastelo de Tibaldo. Li povis retrovi sian vojon. Memore al la besteto, kiu rompis la sorĉon, Francisko adoptis la salamandon kaj insignon, kaj decidis, ke li konstruigos ĉaspavilonon sur tiu sama loko, kie li ĝin renkontis. Tia estas la legendo de la kastelo de Chambord, multe pli bela ol la nura historia vero.

Ne longe post tiu aventuro, la 1-an de januaro 1515, Francisko fariĝis reĝo Francisko la Unua. Li estis nur 20 jara. Kvin jarojn poste, 1.800 laboristoj estis senditaj sur la loko, kie staris la ruinaĵojn de la kastelo de Tibaldo, kaj komencis la konstruon, ne de simpla arbara, rendevuejo, sed de grandioza palaco. Impona konstruaĵo, laŭ ĝenerala aspekto de fortika kastelo, ĝi estas ĉefverko de la Renesanca konstruaro. Novajon iniciatis la reĝo : anstataŭ tegmento, vasta teraso, de kie estas facile vidi la ĉasantojn en la ĉirkaŭa arbaro. Kun ĝiaj 365 kamenoj, multegaj kolonoj, ornamitaj de 800 kapiteloj ĉiuj malsamaj, tiu teraso aspektas, kiel vera aera vilaĝo. Ĝi estas unika arkitekturaĵo, same kiel la kurioza duobla ŝtuparo, per kiu oni ĝin aliras.

Francisko estis granda, eleganta viro, sprita, artistema, vera modelo de la ideala « galanta kavaliro » de tiu epoko. Tial, li havis multajn sukcesojn en siaj virinaj rilatoj. Malfidela li ja estis, sed ankau suferis por virina malkonstanteco. Iun melankolian tagon, li tion esprimis per la du famaj versoj skribitaj per sia ringo sur vitraĵo de sia ĉambro :

« Virino ofte varias,
Malsaĝa kiu ŝin fidas ».

Oni diras — ĉu legendo, ĉu historia fakto ? — ke lia glora posteulo, Ludoviko XIV-a mem rompis la vitraĵon omaĝe al sia amatino.

Tri jarcentojn pli malfrue, tiuj du versoj inspiris unu el la plej belaj muzikaĵoj de la itala muzikarto. La itala komponisto Verdi verkis la faman operon « Rigoletto » laŭ poemo de la itala poeto Piave, inspirita de dramo de V. Hugo, « La Reĝo sin amuzas » temanta pri drameca amaventuro de Francisko I-a. En la opero, la reĝo — kiu fariĝis duko de Mantovo — kantas tre belan kanton : « Kiel plumo en vento », kies rekantaĵo estas ĝuste la versuĉo de Chambord. Tradukita francan de E. Desprez, la opero havas ĉiam grandan sukceson en Francujo, kaj la kanto de duko de Mantovo fariĝis tre populara. Eĉ tradicio estiĝis : duko de Mantovo ĉiam aperas sur la francaj scenejoj kun la vizaĝo de Francisko I-a. Chambord okupas tute apartan lokon en arto. Tie, Molière kreis en 1669 du el siaj komedioj : M. de Pourceaugnac » kaj « La Burĝo Gentilhomo ».


La brila epoko de Chambord finiĝis je la Franca Revolucio. En 1821, ĝi estis vendita. Laŭ iniciato de franca nobelo, la kastelo estis acetita dank'al publika monokolekto, kaj donacita al duko de Bordeaux, heredonto de la franca trono. Post diversaj ŝanĝoj, la kastelo estis fine acetita de la franca ŝtato en 1932.

Dum la dua mondmilito, ĝi fariĝis ŝirmejo por la trezoroj de la francaj muzeoj kaj por la vitraloj de la katedraloj. Fakte, ĝi neniam estis bombardita. Kelkaj pretendas ke, Hitler firme kredanta je sia fina venko, konsideris, ke Chambord estis legitima bieno de la aŭstra-

itala familio, kiu ĝin iam posedis kaj por tio ne volis, ke ĝi estu detruita. Eble pli simple estas kredi, ke ĝi estis savita dank'al sia situo meze de arbaro, sen ia strategia intereso. Nun Chambord estas unu el la plej vizitataj kasteloj de Francujo ĝia sonluma spektaklo estas vere grandioza, kaj altiras multegon da turistoj.

La vasta parko, ĉirkaŭata de unu muro 42 kilometrojn longa fariĝis ŝtata bredejo por ĉasbestoj : en ĝi pace vivas cervoj, kapreoloj, fazanoj, ktp ; la arbaro ne plu rehas la boĵojn de la hundoj kaj la voko de la ĉaskornoj. Nun ĉas konsistas nur el pelado de la bestoj en retegojn, kie ili kaptiĝas, kaj estas poste senditaj preskaŭ en la tuta mondo.

E. MOTILLON.



Kastelo de Chambord

(Kliŝo « Nouvelle République du Centre-Ouest »)

MONDA PROBLEMO

ĈU BALDAŬ MANKOS LA AKVO?

La XX-jarcenta mondo estas la mondo de la fabrikoj, de la maŝinoj, de pli kaj pli mekanika vivo. Eĉ en vilaĝoj oni konstruas uzinojn. La homoj pli kaj pli simpligas la ĉiutagan vivon per uzado de hejmaj maŝinoj. Ĉar tiuj maŝinoj funkcias per elektro aŭ gaso oni konstruas novajn elektro-centraĵojn kaj gasuzinojn. Pro la disvastigo de higieno, ĉiuj novaj domoj kaj ankaŭ malnovaj estas ekipitaj per ban-ĉambroj. La lavujoj estas multe pli grandaj ol la antaŭaj pelvetoj. Pro pli granda legemo de la homo oni fabrikas pli kaj pli da papero. Same, la moderna mondo bezonas pli kaj pli da kaŭĉuko, da petrolo, da ŝtalo, da nilono, k.a. Oni fekundigas pli kaj pli da grundo per irigacio kaj industrie enladigas pli kaj pli da mangaoj.

Pli kaj pli ampleksigas la akvokonsumado. Estas necese uzi 20 litrojn da akvo por rafini 1 litron da petrolo; 250 litrojn por fabrikii 1 kg. da ŝtalo; 800 litrojn por fabrikii 1 kg. da artefarita silko; 2,400 litrojn por 1 kg. da sinteza kaŭĉuko; 2,000 litrojn por 1 kg. da bona papero. La uzitaj akvoj ne estas perditaj. Sed plej ofte la reuzado de tiuj akvoj postulas specialajn aparatojn kaj kostajn laborojn. Fakte, pli kaj pli, la riveroj farigas kloakaj elfluoj. Ili entenas acidojn, bakteriojn, ktp. Pli kaj pli nereuzeblas estas la eluzitaj akvoj. La konsumado pli kaj pli rapide grandiĝas. Baldaŭ ne plu sufiĉos la ordinare utiligitaj fontoj. Estus necese trovi novajn aŭ plirapidigi la akvan ciklon. La nuboj malsargigas je sia akvo sur la teron; tiu akvo parte fluas al la riveroj kaj al la maro; alia parto eniras la grundon kaj plialtigas la nivelon de la subteraĵ

akvoj; tria parto revenas al la atmosfero, per vaporigo aŭ per transpiro de la plantoj.


La hidrologoj provas influu tiun ciklon. Oni entuziasmiĝis pri la artefarita pluvo, la « prisemado » de la nuboj, la sursuto de la nuboj per « karbon-nego », ktp. Sed la provoj ne estis pruvaj. Oni ankaŭ studas la misteron de la subteraj akvoj, kies iradon oni nun sukcesas sekvi en multaj kazoj sed kies kvanton oni tute ne konas. Oni dezirus utiligi la glaciokojn kiel novan fonton kaj distribui la degelakvon per tubegoj. Oni provas mairapidigi la vaporigon per surfacaj maldikaj tavoloj de ctila acido.

Sed la granda ideo estas disponigi al la homoj la akvon entenantan de tiuj ege grandaj rezervujoj: la oceanoj. Sed tiu akvo estas riĉa je 35 gr. da salo po litro, kaj akvo konsumebla de la homoj kaj bestoj estu sepdek foje malpli sala. Jam pluraj centoj da miloj da homoj konsumas sensaligitan maran akvon: sur ŝipoj, en Koweit (kie akvo estas multe pli kosta al benzino). Diversaj teknikoj ekzistas: ĝis nun oni konstatis, ke tiel « farita » akvo estas multe kosta; ekz. en Sahara dezerto la trinkebla akvo havita de la tieaj akvoj pere de sunenergia kosto 8 novajn francajn centimojn po litro. La du ĉefaj promesplenaj teknikoj estas: distilado kaj glaciigo.

Koncerne distiladon, la mara akvo estas varmigitita en grandegaj bolujoj kaj oni ĝin sendas en diversaj sinsekvaj vaporigoj; en ĉiu el tiuj vaporigoj, la vaporo densiĝas en nesalan akvon kaj la redonita varmo estas utiligata por varmigi la salan akvon en la aliaj bolujoj. Sed aliaj teknikoj estas uzataj: oni nebuligas la akvon en malalta premo (saman rimedon oni uzas por senakvigi la lakton); oni ankaŭ agas per elektrodializo.

Sed la plej promesplena tekniko estas la glaciigo. La marglacio donas sensalan akvon. La sala akvo estas malvarmigita kaj enkondukita en malaltpreman bolujon. Parto de la akvo vaporigas, alia parto glaciigas en kristalojn entenantajn la salon. Oni sensaligas ilin. Kontakto de la vaporo kaj de la glacio, nebuligas la unuan kaj fandas la duan. La tiel havita sensala malvarma akvo estas uzata por malvarmigi la marakvon ricevitajn en la sistemo. Tia tekniko estas multe malpli kosta ĉar oni tiamaniere havas akvon kies produktprezo estas unu nova franko po kuba metro.

En la estonta tempo verŝajne venkos la dua tekniko ĉar la glaciigo de akvo necesigas multe malpli da kalarioj ol la boligo. Despli interesa estas la sensaligo de la marakvo ke tiu tekniko postulas mineralajn kromproduktojn kaj multvaloralajn materiojn; la oceanoj estas neelĉerpeblaj riĉegaj minejoj. La timo pri la manko de konsumebila akvo malfermis la « akvoepokon ».



18-kilometra akvotubo estas subakvigita por alporti akvon al la insulo Yeu en la Atlantika Oceano apud la Vendée-a bordo.

SUB LA GRANDA KVERKO

Somero en Grésillon

Sufiĉe kontentiga estis la lasta somero. Se en Aŭgusto la kastelo ne estis vizitata de la kutima « svarmo », la nombro de la restadantoj en Julio estis pli granda ol kutime.

La 10-an de Julio alvenis gesamideanoj el diversaj landoj. Dum la unua semajno de la « Kulturaj Internaciaj Fieroj », la partoprenantoj havis la plezuron aŭdi S-ron Llech-Walter kiu, helpe de diapozitivaj, diskaj kaj eĉ per demonstroj, prezentis la katalunan popolon, ĝiajn lingvon, kantojn, dancojn kaj morojn. Poste S-ro Dario Rodriguez parolis kun granda kono pri la lingvaj konfliktoj en eŭropaj landoj. Li ankaŭ prezentis la « Oran Metodon » iniciatitan de D-ro Perenoud, instrumentodon originalan baziĝantan sur la aglutina aspekto de la internacia lingvo. S-ro Babin parolis pri la « Evoluo de Edukado » de... Adamo ĝis nia epoko.

En la dua semajno kun granda ĝojo la Grésillonanoj akceptis S-inon Lapenna kiu, malgraŭ grandaj malfacilaĵoj kaj survojoj malagrablaj spertoj, sukcesis viziti la Kulturdomon kaj profitigi la ĉeestantojn per siaj grandaj konoj pri diversaj aspektoj de Esperanto-vivo. Ŝi unue parolis pri « Popular-sciencaj temoj en Esperanta literaturo », montrante la gravecon de tiutemaj verkoj per ekzemploj pri la progreso sur tiu-ĉi kampo en la lastaj jaroj.

En dua prelego titolita « Dramo en la esperanta literaturo », S-ino Lapenna majstre donis ampleksan rigardon super tiu grava temo.

Sekvis paroladoj pri « Radio-elsendoj en esperanto » kaj « La recenz-laboro en esperanta preso ». Okaze de tiu lasta prelego, S-ino Lapenna montris ke ne ĉiuj kapablas fari « recenzojn » kaj ke bona recenzisto pri poezio ne ĉiam estas tiel bona recenzisto pri dramoj kaj inverse.

D-ro Albault pritraktis unue la tre gravan problemon de « La malsato, monda plago ». Li poste parolis pri « Akuŝo sen doloro » kaj pri « Seksologiaj problemoj » kiuj altiris grandan intereson kaj... diskutadon.

Dum la sama periodo ankaŭ okazis ekskursoj al Angers (taŭge preparita de S-ino Chevery per prelego tre detala kaj prezentado de diapozitivaj) al la Loire-kasteloj, al la kastelo Le Lude okaze de la mire bela vespera spektaklo kaj al aliaj regionaj vidindaĵoj.

De la 24-a de Julio ĝis la 7-a de Aŭgusto okazis kursoj gvidataj de S-roj Ribot kaj Bourde-

lon. La ĉefa celo de tiuj kursoj estis pretigo de gesamideanoj al baldaŭ instruado de la lingvo.

En Aŭgusto la « Esperantistaj Semajnoj » kunigis la Francojn (nur kelkaj eksterlandanoj vizitis la kastelon en tiu periodo) dezirantaj lerni aŭ praktiki la lingvon. Tri kursoj okazis : porkomencanta kurso gvidata de F-ino Joselyne Berthelot ; praktika kurso gvidata de S-ro Thébaud ; supera kurso gvidata de S-ro Babin. Tiuj tri semajnoj renkontis la kutiman sukceson kaj la vesperoj, gvidataj de la partoprenantoj mem, estis variaj kaj amuzaj.

Fine antaŭ la fermo de la kastelo alia Esperanto-kurso gvidata de S-ro Ribot sub la aŭspicioj de U.E.F. okazis ek de la 30-a de Aŭgusto.

Entute la somero estis fruktodona kaj ĉiuj trovis tion, kion ili serĉis : lernadon kaj praktikon de la lingvo. Jam prepariĝas la 1962-a programo kiun la interesatoj povos peti en Oktobro.

Ni promenu ĉirkaŭ Grésillon

Jam pli ol semajno mi trapasis en la kastelo « Grésillon », kaj ŝajnas al mi ke mi ĵus vekigis el sonĝo kaj nur hieraŭ mi alvenis al la bela domo, tute ruĝa kaj blanka inter la verdaj arboj de ĝia granda parko.

Pri la vivo en la kastelo mem, mi ne volas tie ĉi paroli ; vi jam scias, pere de la « Kulturaj Kajeraj », kiel ripoziga kaj agrabla ĝi estas. Sed kvankam oni povas ĉi tie trovi pacon kaj ĝojon, oni kelkfoje aŭdas kaj eĉ sentas la alvokon de la nekonataj landoj, kaj oni volas fariĝi esploristo ! Ankaŭ tion Grésillon donas al vi ! Iru ĝis la antikva dolmeno en la proksima pinarbaro kaj revu pri la longpasinteco ; iru tien ankaŭ dumnokte kaj vidu eble la nombrajn fantomojn danci en la lunlumo ! Vi ne ŝatas fantomojn ? Do, ne gravas : veturu ĝis la arbaro Chandelais — granda arbaro ĉirkaŭ sep kilometrojn de Grésillon ! Ankaŭ tie, sub la majesta kolonaro de la pinoj kaj kverkoj, paco atendas vin. Ankaŭ grotojn vi povas tie esplori.

La proksima urbeto Baugé enhavas multajn malnovajn domojn, kaj pitoreskan rivereton. Tie, ne forgesu viziti la renesancan kastelon, kun ĝiaj belaj fenestroj kaj majesta ŝtuparo.

Vi ŝatos vidi ankaŭ la belegan malnovan apotekĉambron en la malsanulejo, kaj eble la reale multvaloran « Krukon ». Vidu, oni ne povas enui en Grésillon.

Madeleine FORICHON.
(teksto verkita okaze de ekzameno).

Edukado en antikva Grekujo

kaj antikva Romo

*(Parto el la prelego farita de S-ro Babin
okaze de la Kulturaĵ Internaciaj Ferioj
en Gresillon).*

Antikva Grekujo estis la fonto de niaj literaturo, artoj, filozofio kaj teoriaj sciencoj. Ĝi ankaŭ estis la fonto de nia ĝisnuna klasika edukado. Sed kia estis la Greka edukado? Ni devas konsideri du tre malsimilajn formojn de edukado: la Sparta kaj la Atena. La Spartoj estis militista popolo de invadintoj, vivantaj en malamika lando, ĉiam singardaj meze de 100.000 ilotoj. Tiuj ilotoj estis submetitaj kamparanoj. En tiu lando vivis ankaŭ 250.000 periektoj, primitivuloj sen politikaj rajtoj. Konstante timanta, ke iliaj dekaroble pli multaj sklavoj superŝutu ĝin, la invadinta aristokratio konis nur unu formon de edukado: la militista. Konsekvence la sparta edukado estis ankaŭ sporta kaj civitana. La spartanoj devis esti fortaj, kuraĝaj, obeemaj je leĝoj kaj sin dediĉantaj al la patrio. De la 7a ĝis la 20a jaro la junulo vivis en tendaro ekzercante pri gimnastiko, kaj ĉasado, vivante senlaskan vivon, submetite je severa disciplino. Longaj marŝadoj, diversaj mankoj, kiujn invitis lin havigi al si manĝaĵojn ĉe per ŝtelo, lasis nenium tempon al intelekta formado. Tiu lasta estis tute ne utila (estis eĉ malutila) por militistaj disciplinemaj civitanoj, kaj pri artoj, la spartanoj konis nur religian muzikon, la poemojn de Homero kaj kelkajn primitivajn kantojn. En tia komunumo la individuo valoris nur kiel ano de la grupo. Kaj por firmigi sian potencon, la ŝtato decidis, je la naskiĝo de la infano, ĉu li vivos aŭ ne; La junulinoj estis edukataj laŭ la samaj reguloj, kiel la junuloj, ĉar ili devis naski fortajn infanojn kaj preferi la patrion ol siajn proprajn infanojn. Je la 18a jaro la junuloj ekzerciĝis en la ĉasado de homoj; ili postkuris kaj mortigis ilotojn.

En Ateno la edukado estis multe pli liberala. Tiu edukado estis agrabla miksaĵo de fizika kaj estetika formado. Platono kaj Aristoto konsideris muzikon la plej bona rimedo por satigi la ordemon, la belecon kaj la regecon de pasioj. Gimnastiko ne celis al korpa formado sed al ekvilibro de forto kaj eleganteco, de lerteco kaj karaktero.

Tia edukado estis ebla ĉar la materiaj bezonoj estis plenumitaj per la laboro de multegaj sklavoj privataj je homa formado. Dank'al iliaj brakoj, la altranguloj povis laŭplaĉe vivi kaj zorgi pri la edukado de gejunuloj. Ĉar en tiu atena demokratio eĉ la plej liberalaj filozofoj konsideris sklavecon necesa por la libereco. Sed en Ateno, kvankam la individuo estis submetita al la ŝtato, li povis pli libere uzi siajn kapablojn. Edukado celis al bono kaj feliĉo de la individuo. Ĝis la sepa jaro la infano ricevis familian edukadon sed poste la leĝo devigis la patron donigi al li sufiĉan instruon. En la lernejo li lernis la legadon, la skribadon, la mitologion kaj iom da kalkulado. Li skribis per metala aŭ ebura skribilo sur vakso-kovrita tabuleto. Li perkere lernis poemojn. Poste li lernis la elementojn de geometrio, desegnado kaj muziko, kaj je la 14a praktikis sportojn. Je la tempo de la Peloponez-milito ne plu estis


analfabetuloj en Grekujo (krom la multaj sklavoj, kompreneble). Eĉ la manlaboristoj kaj la kampkultivistoj atingis malaltan edukan nivelon. La plej altrangaj junuloj ricevis poste militistan, civitanan kaj moralan edukadon. Tiu edukado, kiu ne submetis la homon al la potenco de la ŝtato estis la unua paŝo al la akcepto de la ideo, ke homo valoras, ne nur rilate al la socio sed ankaŭ en si mem. Sed la tuta sistemo laŭiris malgustan vojon; unue ĉar la grekoj malestimis la manlaboron, due ĉar la plej riĉaj grekoj instruigis siajn infanojn de retorikoj kaj sofistoj. En Sparto oni malpermesis al la civitanoj profitele labori; en Ateno la manlaboristoj sidis sur la plej malalta socia ŝtupo. En Tebo la vendisto povis fariĝi ŝtatoficisto nur kiam ili jam de 10 jaroj ne plu profesiiis. La edukado donita al la junaj grekoj rapide iĝis dangere formala ĉar la instruado de elokventeco kaj filozofio akirigis nur malprofundajn kaj pretendemajn sciojn. La vortoj superis la ideojn, la veron kaj la sincerecon.

En antikva Romo ni devas konsideri du periodojn. Unue antaŭ la konkero de Grekujo la Roma edukado estis praktika kaj morala. Tiu korpa, moral, militista kaj religia edukado estis donita en la familio, potence ĉelo. Pro manko de nacia literaturo la junuloj ricevis nenium intelektan formado. Tia edukado naskis popolon de militemaj, lojalaj civitanoj. Sed tiuj homoj estis ankaŭ egoistaj kaj profitemaj. La patro estis tutpotenca. Kiam infano naskiĝis oni prezentis ĝin al la patro kuŝantan sur la tero. Se la patro prenis ĝin en siajn brakojn, tio signifis, ke li akceptas ĝin sed la Leĝo de la dekdou Tabuloj ordonis al li sufokmortigi aŭ droni ĝin se ĝi estis malforta. La 9an tagon ĝi ricevis nomon kaj ĉirkaŭ ĝian kolon oni pendigis amuleton, kiun ĝi konservis ĝis la plenago. La edukado estis donita de la patro aŭ, en riĉaj familioj, de instruisto. Poste la infanoj iris en lernejojn, kie la disciplino estis tre severa: fresko montris lernantojn rigardantaj al kamarado tute nuda vergata de la instruisto. Je la 17a jaro la juna romano demetis la amuleton, estis enskribita en sia tribo kaj prezentigis sur la forumo.

Sed de post la 2a jarcento, post la konkero de Grekujo komenciĝis dua periodo. Tiu renkonto kun la greka civilizacio okazigis luktojn inter la tradicio kaj la nova spirito. Grekaj instruistoj (ĉefe sklavoj) instruis gramatikon, literaturon kaj retorikon al la infanoj de la riĉaj familioj. La unuan fojon studado de alianda lingvo, la greka, aperis. Poste oni studis la verkojn de la latinaj verkistoj Horatio, Virgilio kaj Kikero. Nobelaj familioj sendis siajn knabojn al Grekio por sekvi la kursojn gvidatajn de famaj oratoroj. Post la Respubliko, en la tempo de Imperio, la urbestroj organizis lernejojn, kaj tiujn lernejojn oni renkontis ankaŭ en la submetitaj landoj. Ili estis tre taŭgaj enveturigiloj de la latina civilizacio. Tiu graveco de la latina lingvo ankoraŭ pli grandigis, kiam kristanismo elektos ĝin kiel liturgia lingvo? Romo rekonis la valoron de la greka civilizacio kaj edukado, kaj transdonis ĝin al siaj posteuloj. Sed ĝi forigis sciencon kaj ne-literaturajn artojn; ĉar ĝi konsideris ilin neutilaj. Pro tio, la okcidenta idealo pri edukado estos nur literatura kaj parola. Oni pli ŝatos la esprimadon ol la esprimajon.


LA MODERNA TEKNIKO

LA MAGIE DE CLIO



Tiu foto montras « Clio », tre opuntan instrumenton por la prezentado de la spektakloj « Sono kaj Lumo », kiuj la vizitintoj de Grésillon bone konas.

Tiu ŝalto-tabulo ebligas, dank'al la elektroniko, kombini kaj prezenti mirindajn spektaklojn sen neceso de definitivaj fiksaj instalaĵoj.



Tiuj Japanoj pravas, ke ne estas necese forlasi la prapatrajn kutimojn por plene ĝui la modernan teknikon.

Tra la Esperanta Literaturo

SENTIS HENRI

Franco, doktoro de sciencoj (1897), profesoro licea de fiziko. Naskiĝis en Paris, mortis la 15an de decembro 1933 en Grenoble. Esperantisto de 1898, gvidis kursojn, faris propagandajn broŝurojn, kreis E-grupon en Grenoble kaj kunlaboris en E-gazetoj.

Verkis : Urso, novelo 1906.

Blua Kardo 1923 k.t.p. kun reformemaj tendencoj. Li batalis por « racia evoluo de Esperanto » kies celo estis enkonduki kelkajn ŝanĝojn en la lingvon.

(El Enciklopedio J.

LA URSO

(teksto eltirita el la originala novelo
de H. Sentis)

ANTAŬPAROLO

— « Vi neniam verkis ion, kaj vi komencas skribante en Esperanto. Duobla danĝero ! »

— « Tute kontraŭe, mia amiko, ĉar mi esperas ke mia rakonto profitos la intereson vekitan de la nova lingvo, kaj estos indulgita pri ĝi. »

— « Mi komprenas ; vi fidis je la proverbo : bona saŭco akceptigas malbonan fiŝon. »

— « Via proverbo estas flata nur duone. Tamen ĝi estu feliĉa antaŭdiro ! »

Noto. — En la Fundamento, kelkaj verboj estas, laŭ unu traduko, nur transiraj, laŭ alia, samtempe transiraj kaj ne transiraj. Mi akceptis ĉi tiun duoblan sencon ; ĉar la formado de ne-transitiva verbo per aldono de la sufikso « iĝ » estas ofte neĝusta uzo de tiu ĉi sufikso.

Tial bone ĝuas pejzaĝon pentristo, admirante kolorajn scenojn, kies fiksado sur tolaĵo li ofte provis kaj malofte sukcesis, kaj ankaŭ literaturisto, kiu penas esprimi per vortoj la konfuzan senton, aŭ helan aŭ melankolian, kiun la okuloj enverŝas en lian koron. Bone rigardas geologiisto, kiu studas la landan karnon, kaj per la pero de la nunaj cikatroj suspektas en nekalkuleble malantaŭa malproksimo, la terurajn dolorojn de la naskiĝo ; ankaŭ botanikisto, kiu amas ĉiujn partojn de la pejzaĝo, pro la memoro de ĝojigaj eltrovoj, iam faritaj, aŭ pro la espero de aliaj farotaj.

Paŭlo Deltur fariĝis ja iom botanikisto. Estas vere ke li botanikis nur pri unu floro ; ta-

men per ia sorĉaĵo, la lando akiris subite pli interesan aspekton. Ĉu ĝi ne estis la juvelo entenantanta la serĉatan trezoron ?

Li transiris la valon kaj komencis vigle supreniri la monton, kiun oni montris al li. Baldaŭ la vojo atingis densan arbaron larikan, kies bordoj ĝi sekvis.

— « Mi devas iom rapidi » pensis Paŭlo. « Tiu irejo ŝajnas tro longa. Mi supren iru rekte. Plie, la irado estos pli agrabla en arbaro. »

Li eniris la arbaron. Sed la deklivo estis forta. Liaj sennajlaj ledplandoj fariĝis tre glitigaj de frotado sur la grameno (herbaĵo mal-longa kaj densa) ; kaj post du horoj da ekzer-cigado, kiun li ne estis kutiminta, li fariĝis tre laca kaj haltis por ripozi.

Tiam li komencis maltrankviliĝi, ekvidinte ke la ĉielo rapide sin kovras per grizaj nuboj. Ĉiuj signoj de civilizo estis malaperintaj, kaj solena silento ĉirkaŭis lin. Nenia pepado de birdoj aŭ zumado de muŝoj estis aŭdebla ; eĉ plej malgranda svingo de branĉeto ĉesis. Li sentis strangan impreson, kvazaŭ ĉi tiuj altaj senmovaj arboj rigardus lin kolere.

« Eble mi pli bone farus, malsuprenirante » li pensis. Sed tio estus malkuraĝaĵo. Kredeble, de la tempo kiam mi marŝas, mi nun proksimas la vilaĝeton, en kiu mi trovos ŝirmejon. Plie kelkaj gutoj da pluvo ne timigas min. » Kaj li daŭrigis la supreniradon.

La vetero fariĝis pli kaj pli nigra. Subite fulmo ekbrilis ; tondro skuis la arbaron kaj rulis en la montoj ; dikaj gutoj komencis soni sur la folioj. Paŭlo, akcelinte la marŝadon, alvenis al la piedo de granda amaso da rokoj, en kiu li ekvidis, je deko da metroj supre, lokon ŝirmatan kontraŭ la pluvo de ŝtonego superkuŝanta. Tuj li penis rampi ĝis tie, kaj post kelkaj provoj, sukcesis la aferon ; sed ne sen iom da difekto por siaj elegantaj vestaĵoj. Tiam, sin preminte en angulon, li aŭskultis rezignacie la frapadon de la pluvo, kiu faladis, kvazaŭ per riveroj, kaj tondroj, kiujn la montaj eĥoj al si reciproke reĵetis.

Longe li restis en tiu malagrabla situacio. Fine la bruado ĉesis ; kaj kiam Paŭlo aŭdis la lastajn gutojn kviete sonadi, li intencis malsupreniri de sia piedestalo. Tiam li tre surpriziĝis. La surfaco de la roko ŝajnis tute glata, kaj li ne povis kompreni per kia rimedo, li sukcesis atingi la lokon, sur kiu li troviĝis. Li eksciis, al sia domago, ke, sur la ŝtonegoj estas multe pli facila rampi supren ol malsupren. Efektive la malglataĵoj de la surfaco ordinare deklivas al la malsupro ; pro tio, oni ne bone distingas ilin de supre. Tial, en tialaj okazoj, singardema homo ne riskas eĉ unu paŝon, ne bone rimarkinte kia-

maniere li povos fari la saman paŝon malantaŭen, se lia suprenrampo estus devige haltigota.

Por pliigo de malfeliĉo, la nokto estis alproksimiĝanta rapide, kaj promesis esti senluma, ĉar la ĉielo restis kovrita per nigraj nuboj.

— « Tamen mi ne povas eterne figuri statuon tie ĉi » diris al si Paŭlo. Kaj metinte decide la ventron teren, li penis, sin subtenante per la brakoj, kaj frotante la rokon per la piedoj, trovi apoglokon. Sed liaj fortoj konsumiĝis en vana serĉo ; kaj subite, li sin sentis tuj falonta. Tiam streĉinte ĉiujn muskolojn de la brakoj, en ekstrema ekpeno, li sukcesis sin tiri denove sur la teraseton, kie li restis kuŝanta sur la brusto, tremanta kaj spireganta.

Kiam lia spirado trankviliĝis, li konsiliĝis kun si mem. Kion do fari ? Li ĵetis longajn alvokojn ; sed la larikoj ŝajnis sin unuigi runde, por sufoki la bruon.

— « Nu » li konkludis malĝoje, « necesos pasigi la nokton en tiu neagraba situacio. Estos ankoraŭ feliĉo, se la pluvo ne revenos. Mi estu pacienca, kaj dormu se eble. »

Sed tio ne estis ebla. Tremetanta de la malvarmo alportita de la pluvo, kaj malvole impresita de la nokto, kaj de la plialtiĝo de la larikoj tute nigraj, li, iom post iom, fariĝis nervema. Li provis ankoraŭ kriadon ; sed lia voĉo tiel lugubre sonadis, ke, li timigita, tuj ĉesis.

Tiam eniris en lian cerbon la rememoro pri tiu montano, kiu matene parolis kun li. Ĉu vere estas ankoraŭ unu urso, en tiu malhela arbaro ? Nune, tio ne estis plu verŝajna ; kaj nevole li atentigis la orelojn, iom skuita de la subita brueto, ĉe la falo de iu akva guto, malfruiĝinta sur branĉo.

En tiu momento, li aŭdis strangan grincon, kvazaŭ graton de ungegoj kontraŭ ŝtono. Kliniĝinte super la rando de la ŝtonego, li sin reĵetis malantaŭen, duone svenanta pro teruro. Li estis vinda grandan nigran beston kiu rampis al li.

Post kelkaj sekundoj, kapo elŝoviĝis ĉe la nivelo de la teraseto, kaj homa vojo kriis :

— « Kion vi faras tie ? »

Paŭlo estis nekapabla respondi.

— « Vi ne povas plu malsupreniri, ĉu ne vere ? Ventu ! »

Mano ektiris unu kruon de Paŭlo, kiu, penante ordigi sian spiriton, obee sekvis la direkton donitan, kaj, sen ia hezitado, sin konfidis al

la manoj, kiuj metis liajn piedojn en ĝustajn lokojn.

Unu minuton poste, li kuris, per la tuta forto de siaj rigidigintaj kruroj, post sia kondukanto, kiu, ne elparolinte unu vorton, marŝis, per grandaj paŝoj, kvazaŭ li promenus, tage, en horizontala irejo. La pluvo rekomencis ; sed ne niu el ili faris ian rimarkon pri tio.

Tempo pasis, kiu ŝajnis longa al Paŭlo. Tiam la nekonato, montrante vojeton, kiun la blankaj ŝtonetoj, amasiĝintaj en ĝi, vidigis en sufiĉa maniero :

— « Jen via vojo. Penu ne perdi ĝin, kaj ĉiam tenu vin je la dekstra flanko. Sed iru plej rapide, por ke la malsano ne kaptu vin. » Kaj li tuj rekomencis la marŝadon reen.

— « Kiu vi estas ? » kriis Paŭlo al la ombro jam malaperanta.

De malproksime, respondo venis.

— « Oni min nomas la Urso ! »

Novaj Eldonaĵoj

— La eldonejo Koko (Kopenhago) ĵus eldonis « La Verda Raketo ». Ĝi estas verkita de Jean Forge, kiu jam antaŭ la milito verkis valorajn romanojn. Ĝi konsistas el 9 satiraj noveloj.

— Nova lernolibro por rekta metodo aperis ĉe Eldonejo Nova, Mulhouse, Francujo. Ĝi estas verkita de Carl Walter kaj entenas klarigojn en pluraj lingvoj.

— Alia lernolibro estis ĵus eldonita de Dro Pol Denoel, 20, rue V.-Raskin, Liège (Belgujo). Ĉui el la dek lecionoj estas sekvata de felietona legaĵo.

— Editions Françaises d'Esperanto 11, rue P.-Vergne, Marmande, Francujo) vendas registron sur sonbendo de ĉiuj eksplikoj por la lecionoj de la franclingva lernolibro « Ni parolu en Esperanto ».

— Ĵus aperis, verkita de Ing. M. Simonetti, via Staurengi 24, Varese, Italujo, libreto « Kiamaniere koni la fungojn ? »

FANTAZIAĴO

De Helikoj... al geedziga felico

La baz-nutraĵo de francoj — ĉiu, tra la mondo, tion bone scias — konsistas el ranoj, kaj helikoj. Ĉu troigo ? Iomete, mi opinias !

Jes, la francoj estas kuraĝaj, kaj ne timas fronti al la dudek kvin mil dentoj propraĵo de unu el la sennombraj helikoj ĉasitaj ĉiujare ; jes la helikoj longe, bone preparitaj estas delikata manĝaĵo. Sed, kredu min, la francoj pli ofte manĝas biftekon kun fritterpomoj ol helikoj !

Tamen, mi, franca dommastrino, persone spertis misaventurojn pri erara prijuĝo de tiu pasio, ĉe mia propra edzo.

Iam, dum libertempoj, li kaŝe kolektadis en la ĝardeno, imponon kvanton da konko-limakoj, kaj plenŝtopis grandegan argilan poton. La 13an de julio, antaŭ tago de la franca nacia festo, li triumfe malkaŝis sian trezoron kaj sugestis ke tia delikataĵo plibonigu la morgaŭan tag-manĝon.

(Malfermante parentezon, mi devas diri, ke en Francio — kiel alie, sendube — la idealoj ĉe edzo kaj edzino ofte diferencias : senlabora viro volonte profitas feriojn por organizi, laŭ sia propra teraperamento, idealan hejman vivon. Povas temi pri la tiel nomataj « hejmlaboretoj » t.e. miloj da okupoj diversaj : domaj, garaĝaj, aŭ ĝardenaj laboretoj. Aliaj uloj preferas legi, fumi, kartludi. Tamen, preskaŭ ĉiuj asocias al festotago, ideon pri bona manĝado.

Kontraŭe, la dommastrino, kiu malofte ĝuas la kompanion de la amato preferas simpligi la diversajn tedajn preparojn, kaj profiti agrablan kuneŝtan ripozon post rapida, kvankam agrabla familia manĝado).

Ankoraŭ nun, mi ne forgesis la tiamajn antagonismajn argumentojn por aŭ kontraŭ la preparado de gluecaj bestetoj por soleni datrevenon de la Bastila venkopreno. Finfine, kompreneble, oni manĝis helikojn tiun 14an de julio !

Kelkajn jarojn poste, mi, kune kun mia edzo translokiĝis al milit-kampadejo en la provinco « Champagne » produktodona de ŝauma vino kaj helikoj.

Dank'al lerta servistino, speciale kapabla pri la purigado kaj preparado de la preciozaj konkolimakoj, mi rapide akiris en la ĉirkaŭaĵoj faman reputacion pri helika kuir-arto.

Ĉu vi deziras provi mian recepton ?

Laŭ la regiono, oni elektos egajn bestojn

kun flav-blankaj konkoj, aŭ etajn grizajn helikojn ofte preferatajn de la amatoroj.

Ne necesas « kuri la kamparon » por ĉasi tiujn bestojn. Sufiĉas promenadi en familia ĝardeno, frumatene aŭ prefere post fulmotondro, tenante profundan ujon kaj direktante la okulojn al grundo, al mur-truoj aŭ randoj de aleoj sub verdaj bordaĵoj.

Tagon post tago, tiamaniere vi kolektos la kontentigan kvanton. Ne forgesu kovrilon sur la argila poto, sed enlasu trapasi iom da aero. Nun, estas debato : ĉu oni devas nutri aŭ fastigi la viktimojn ? Fakte pli bone estas nutri ilin. Tio almenaŭ estis la opinio de mia patrino. Tamen, unue, ili devas tute eljeti la eble venenajn antaŭajn nutraĵojn.

Poste, ĉiutage, donu al la karaj bestetoj foliojn de salato, prefere laktuko, kaj diserigitan panon trempitan en lakto. Tiamaniere, vi ricevos altkvalitajn helikojn dikajn kaj molajn.

Ĝis tiu stadio la laboro estas pli, malpli plaĉa. Poste, mi kore konsilas al vi trovi volontulon por la lavado. Laŭ mi, estas la plej malagrabla parto de la afero. Oni devas lavi, kaj relavi la helikojn ĝis la glueca ŝaumo tute malaperis. Fine oni ĵetas la tutan ĉasaĵon en bolantan akvon aromigitan de riĉaj parfumoj : blanka vino, salo, pipro, petroselo, timiano, ajlo, cepoj, spiclaŭro, kaj entenantan, zorgeme enfermita en tuketo, iom da ligna cindro.

Post sufiĉa kuirado, oni eltiras la bestetojn el la konkoj kaj senigas ilin je la nigra hepato. Denove, oni lavas la konkojn kaj aranĝas ilin sur pura tuketo, tiamaniere ke la interna akvo eliru sur la tukon.

Tiam, oni preparas sorĉan miksaĵon faritan el freŝa butero, delikate hakita petroselo, piŝtita ajlo, salo kaj pipro.

En ĉiu konko, oni enmetas iom da odoranta butero, unu helik-limakon, plenŝtopas per plia miksaĵo, kaj disponas sur plado.

La morgaŭan tagon — prefere por la tag-manĝo, rigarde al fragilaj stomakoj — sufiĉas varmigi la pladon en mariabano, elektiti botelon da bona vino, disponi manĝilaron kaj specialajn forketojn kun du longaj dentoj.

Finfine, parfumas la manĝoĉambron edena alhazado, kiu salivigas edzon kaj invitatoron.

Ĝuu vi mem, se plaĉas al vi, kaj donu novajojn !

§-ino POTIN.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO 1961-1962

KONKURSA REGULARO :

1) En la konkurso rajtas partopreni nur abonto de « Kulturaj Kajeroj ».

2) En unu kovert oni povas sendi plurajn solvojn, ankaŭ solvojn de diversaj personoj, sed ĉiu solvo devas esti skribita sur aparta papero.

Nur la plej bona solvo estos konservita por la kalkulo de la poentoj.

3) La solvoj estas sendotaj al :

S-ro P. CHEVALIER

19, boulevard G.-Lauriol, Nantes (L.-A.)

Francujo

antaŭ la fino de la monato sekvanta tiun de la apero de la gazeto.

4) Sur ĉiu papero oni skribu la nomon (S-ro ; S-ino ; F-ino), kompletan adreson, kaj oni aldonu la lastan banderolon de la gazeto.

5) La 1a premio estas senpaga dusemajna restado en Grésillon, kaj la 2a unusemajna restado.

Tiuj restadoj devos okazi ĉu en 1962 ĉu en 1963.

6) La gajnintoj de la du lastaj konkursoj ne povas gajni la ĉjaran. Tamen ili povas partopreni la konkurson.

1a Problemo :

KRUC-VORT-ENIGMO

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13



Horizontale. — 1. Malangelo ; Ortega birdeto. — 3. Sangon soifanta batalilo ; Montegara landeto. — 5. Numeralo ; Sovaga porko ; Supermezura. — 7. Kulrivazo ; Prepozicio de tempdaŭro ; Teksajo. — 9. Belega floro ; Paradema birdo ; Frakcio. — 11. Granda rabobesto kun nigraj makuloj ; Papi-lieto inter la vestaĵoj. — 13. Ruĝa frukto ; Reĝaj seĝoj.

Vertikale. — 2. La plej norda respubliko ; Juvelŝtono. — 4. Granda dombesto ; skribsigno ; Montra vorto. — 6. Prepozicio montranta najbarecon ; Sudamerika lando. — 8. Norditala urbo ; Mara birdo. — 10. Para nombro ; Prezidento de balkana ŝtato ; Malkomenco. — 12. Okcidenteŭropa ; Malmoderna lumigilo.

2a Problemo :

VORTO-CENO

Eltrovu la 30 vortojn, kiuj formas ĉenon tiel, ke ĉiu vorto komenciĝas per la meza silabo de la antaŭa vorto. La unua vorto komenciĝas per la meza silabo de la lasta vorto. Ĉiuj serĉotaj vortoj konsistas el tri dulteraĵ silaboj, do el ses literoj. Jen la signifoj de la vortoj : 1. Eŭropa nomado. — 2. Malnovepoka militŝipo. — 3. Malkuraĝa kvarpiedulo. — 4. Glatigi kaj brili per frotado. — 5. Kreskaĵo uzata ĉe bierfarado. — 6. Kontrakto pri asekuro. — 7. Malrapidega senpieduleto. — 8. Surbraka vestparto. — 9. Argentsimila metalo. — 10. Angelo. — 11. Malhelruĝa juvelŝtono. — 12. Blankligna arbo. — 13. Suftera vojo. — 14. Nepre bezonata. — 15. Blua kampa floro. — 16. Vira nomo. — 17. Vosthava stelo. — 18. Mitologia monstro. — 19. Malnova ora monero. — 20. Artefarita rivero. — 21. Malzenito. — 22. Superakvego. — 23. Sudsvisa urbo. — 24. Perioda presaĵo. — 25. Agrabla venteto. — 26. Vira nomo. — 27. Sonbildo. — 28. Argila domkovrilo. — 29. Simiego. — 30. Arbeto donanta utiligan kaj tre popularan oleon.

— o —

AMUZAJ PROBLEMOJ (de S-ro Jarlier) :

SOLVOJ DE LA LASTAJ PROBLEMOJ

Nombroj inversigitaj :

Estu : n , $n + 1$, $n + 2$ la 3 ciferoj.

La nombro skribiĝas : $100n + 10(n + 1) + n + 2$.

La inversigita nombro estas : $100(n + 2) + 10(n + 1) + n$.

La diferenco estas :

$$\begin{aligned} & 100(n + 2) + 10(n + 1) + n \\ & - (100n + 10(n + 1) + n + 2) \\ & 100n + 200 + n - 100n - n - 2 \\ & 200 - 2 = 198 \end{aligned}$$

Al ĉiu sia pagparto :

Se ĉiu pagas 720 frankojn anstataŭ 640, t.e. suplementon de 80 frankoj, la suma diferenco estos : $420 + 140 = 560$ frankoj.

Do la nombro de amikoj estas : $560 : 80 = 7$ amikoj kaj la suma prezo estas : $720 \times 7 = 5.040$; $5.040 - 140 = 4.900$ frankoj.

La prezo de unu mango estas : $4.900 : 7 = 700$ frankoj.

La fratinoj :

Viro A edziĝis kun virino B, kaj ili havas filinon C.

A kaj B eksedziĝas. A reedziĝas kaj havas filinon D.

B reedziĝas kaj naskas filinon E. La du filinoj D kaj E havas saman fratinojn C kaj tamen ili ne estas parencoj.

NOVA PROBLEMO :

La horloĝo. — La du montriloj de horloĝo estas ambaŭ, unu sur la alia, sur tagmezo. Je kiuj horoj, inter tagmezo kaj noktmezo, ambaŭ montriloj de nove koincidos ?

Le Gérant : H. MICARD

Imp. COCONIER, Sablé (Sarthe)

Doktoro Ĉioscia

(Fabelo de Grimm tradukita de Kabe)

Estis iam malriĉa kamparano, nomata Kankro. Foje li ŝarĝis ĉaron per ligno, jungis du bovojn kaj veturis en la urbon. La lignon li vendis al doktoro. Kiam li venis por la mono, la doktoro sidis ĉe la tablo. La kamparano vidis, ke li bone manĝas kaj trinkas, kaj ekdeziris ankoraŭ fariĝi doktoro. Li staris momenton kaj fine demandis, ĉu li ankaŭ ne povus fariĝi doktoro. « Certe, — diris la doktoro — la afero estas facila » — « Kion mi devas fari ? » demandis la kamparano. « Unue aĉetu abecelibron, sed tian, sur kies unua paĝo estas pentrita koko ; due vendu vian ĉaron kaj bovojn kaj aĉetu vestojn kaj la tutan doktoran ilaron ; trie mendu pentritan signon : « Mi estas doktoro Ĉioscia » kaj najlu ĝin super via pordo. ». La kamparano faris ĉion, kion oni konsilis al li. Li jam iom doktoris, sed ne tre multe, kiam oni ŝtelis de riĉa sinjoro monon. Oni rakontis al la sinjoro pri doktoro Ĉioscia, kiu loĝas en tiu kaj tiu vilaĝo kaj certe trovos la ŝtelintojn. La riĉulo ordonis jungi ĉevalojn, veturis en la vilaĝon kaj haltis antaŭ la signo. « Ĉu vi estas la doktoro Ĉioscia ? » — « Jes, mi » respondis la kamparano — « Veturu kun mi kaj trovu la ŝtelitan monon. » — « Bone, sed mi ne veturos sen mia edzino Margenjo. » La sinjoro konsentis, prenis ilin ambaŭ kaj ili forveturis kune. Kiam ili venis en la domon de la nobelulo, estis jam preta tagmango, la sinjoro do invitis lin. « Bone — diris li — sed Margenjo eksidu kun ni ». Kiam unua servisto venis kun bele ŝarĝita plado, la kamparano tuŝegis sian edzinon kaj diris : « Margenjo, jen la unua » t.e. la unua plado. La servisto, kiu partoprenis en la ŝteleto, pensis, ke li volas diri : « Jen la unua


ŝtelisto », ektimis kaj diris ekstere al siaj kolegoj : « La doktoro scias ĉion, ve al ni ; li diris, ke mi estas la unua ». La dua tute ne volis eniri, sed vole nevole li devis enporti la pladon. Ekvidinte ĝin, la kamparano tuŝegis la edzinon kaj diris : « Margenjo, jen la dua ». La servisto ektimis kaj tuĵ eliris. La tria ne estis pli feliĉa, la kamparano ree diris : « Margenjo, jen la tria. » La kvara alportis kovritan pladon, kaj la sinjoro diris : « Doktoro Ĉioscia, montru vian arton kaj divenu, kio estas tie. » ; tie estis kankroj. La kamparano rigardis la pladon, ne sciante kion fari, kaj diris : « Ah ! mi malfeliĉa Kankro ! » Aŭdinte tion, la sinjoro diris : « Li tion scias, li do scias ankaŭ, kiu havas mian monon. »

La terurita servisto palpebrumis al la doktoro, ke li eliru kun li. Kiam ili estis en alia ĉambro, ĉiuj kvar konfesis, ke ili ŝtelis la monon ; ili promesis redoni ĝin kaj lin rekompenci, se li ilin ne perfidos, alie oni pendigos ilin. Ili montris al li, kie ili kaŝis la monon. La doktoro, tre kontenta, revenis al la tablo kaj diris : « Sinjoro, nun mi serĉos en mia libro, kie la mono estas kaŝita ». La kvina servisto enrampis dume en la fornaron por konvinkiĝi, ĉu la doktoro scias pli multe. La kamparano sidis, turnis kaj returnis la paĝojn, serĉante la kokon. Li ne povis ĝin trovi kaj diris : « Vi estas tie, vi devas eliri. » La servisto en la forno pensis, ke la doktoro parolis pri li, elsaltis terurita kaj ekkriis : « Li scias ĉion » La doktoro Ĉioscia montris al la sinjoro, kie estas la mono, sed ne diris, kiu ŝtelis, ricevis belan rekompencan de ambaŭ flankoj, kaj fariĝis fama homo.



Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (20 aŭst. ŝil.).
- Belgujo** : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18.
- Britujo** : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (6 ŝil.).
- Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (2,5 guld.).
- Germanujo (Okc.)** : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (3 mark.).
- Germanujo (DDR)** : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (5 mark.).
- Hispanujo** : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (40 pes.).
- Italujo** : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (450 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.
- Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (6 kr.).
- Danlando** : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K (6 kr.).
- Pollando** : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Zlotoj).
- Svedujo** : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (4 kron.).
- Svislando** : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (3 sv. Frank.).
- Usono** : S-ro C.A. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (0,8 aŭ 1 dol.).
- Aliaj Landoj** : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (11 st.), aŭ respondkuponoj (8 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo